



BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 2/2001 (161)

Červen / junio 2001

Enhavo - Obsah	
El parolado de L. L. Zamenhof en Bulonjo-sur-Marco en 1905	2
Raporto pri la agado de nia klubo en la j. 2000	6
Claude Piron pri la lingva problemo	7
B. Němcová: Pri Pečuleto (O Smolíčkovi)	9
B. Němcová: Kiu estas pli malsaĝa? (Kdo je hloupější?)	10
Věra Ludíková pri Jiří Karen kaj Josef Rumler pri Eli Urbanová	12
H. Heine: Lorelei	15

2001 - Evropský rok jazyků

Evropská unie vyhlásila rok 2001 „Evropským rokem jazyků“. Při této příležitosti francouzská revue „Bulletin Européen“ uveřejnila přednášku poslance Gérarda Caudrona, reprezentanta Evropského parlamentu, z níž vyjímáme:

„Jsem šťasten ze skutečnosti, že Evropský parlament ve shodě s Radou Evropy přijal iniciativu stanovit rok 2001 - Evropským rokem jazyků... Hovořit dalším jazykem vedle vlastní mateřštiny je nevyvratitelná záruka duševní otevřenosti. Proto je nutno povzbuzovat mládež, aby se učila jazykům od mateřské a základní školy, to znamená pěstovat pochopení pro kulturní rozmanitost, vzájemně sbližovat Evropany, kteří takto budou mít možnost komunikovat, vzájemně se poznávat a upevňovat přátelství. A konečně konkretizovat myšlenku evropského občanství. Když se všichni budou cítit Evropany, snadněji budou bojovat proti rasizmu, nesnášenlivosti, předsudkům, zlům, jejichž kořeny tkví ve strachu z toho, co je neznámé.

Rok jazyků je prakticky výsledkem společné dohody mezi Evropskou unií a Radou Evropy. Je žádoucí, aby obě používaly stejné logo a stejné heslo. Rozhodně tvrdím, že je nezbytné vytvořit vhodné místo na Internetu, aby se občanům umožnilo připojit se a získat zprávy o tomto projektu.

Je zcela jasné, že jsem nakloněn k studiu cizích jazyků; avšak velice lituji, že se zároveň s tím nevěnuje pozornost esperantu; jazyku, který obsahuje evropské kořeny, dále je jednoduchý, významný, příjemný a lépe naučitelný než jiné. Jako pomocný jazyk by byl řešením pro usnadnění styků mezi národy, zejména mezi Evropany. Vůbec nesouhlasím s tím, že se v evropském jazykovém plánu nemluví o esperantu...“

Tento výňatek jsme převzali z „Informa Bulteno“, prvního letošního čísla věstníku boloňské esperantské společnosti Bolonja Esperanto Grupo „ACHILLE TELLINI 1912“.

Schůze Klubu esperantistů v Praze se konají pravidelně **každé pondělí** mezi **13.00 a 18.00** hod. ve schůzové místnosti v Revoluční ul. č. 5 v 1. poschodí, po pravém schodišti přímo z ulice.

La kunvenoj de Esperantista klubo en Praha okazas regule **ĉiulunde** inter la **13a kaj 18a** horoj en la kunvenejo en Revoluční-str. n-ro 5 en la unua etaĝo, laŭ la dekstra ŝtuparo rekte el la strato.

Eltiraĵoj el parolado de

d-ro Ludoviko L. Zamenhof

en la unua Universala Kongreso de Esperanto en Buionĵo-sur-Marŝo la 5an de aŭgusto 1905.

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas. Mi salutas vin ankaŭ glora lando Francujo kaj bela urbo Bulonĵo-sur-Marŝo, kiuj bonvole oferis gastamon al nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ koran dankon al tiuj personoj kaj institucioj en Parizo, kiuj ĉe mia trapaso tra tiu ĉi glora urbo esprimis sub mia adreso sian favoron por la afero Esperanto, nome al sinjoro la Ministro de la publika instruado, al la urbestro de Parizo, al la franca ligo de instruado kaj al multaj diversaj sciencaj eminentuloj.

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne bnlas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas paflegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema; ĝi estas la sonoj de io granda, kio nun naskiĝas... Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion; sed tio ĉi estis nur révo. Oni parolis pri tio, kiel pri ia dolĉa fantazio, sed neniu prenis ĝin serioze, neniu kredis Pri ĝi.

Kaj nun la unuan fojon la révo de miljaroj komencas realiĝi. En la mal-grandan urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio. Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia reciproká kompreniĝado kaj la n i a ! T i e komprenas sin reciproke nur tre malgranda parto da kunvenintoj, kiuj havis la eblon dediĉi multegon da tempo kaj multegon da mono, por lemi fremdajn lingvojn - ĉiuj aliaj partoprenas en la kunveno nur per sia korpo, ne per sia kápo; sed en n i a kunveno reciproke sin komprenas ĉiuj partoprenantoj, nin facile komprenas ĉiu, kiu nur d e z i r a s nin kompreni, kaj nek malriĉeco, nek nehavado de tempo fermas al iu la orelojn por niaj paroloj. T i e la reciproká kompreniĝado estas atingebla per voj o nenatura, ofenda kaj maljusta, ĉar tie la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ la membro de alia nacio, parolas lián ling-von, hontigante la sian, balbutas kaj ruĝiĝas kaj sentas sin ĝenata antaŭ sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas sin foŝta kaj fiera; en n i a kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plaj malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj , kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj. muroj de Bulonĵo-sur-Marŝo kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed h o m o j kun h o m o j . Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo per faktoj nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montros al la mondo, ke reciproká kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj etema, ke reciproká kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia révo, sed apero tute natura...Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos. Ĉiu, kiu diras, ke la

parolaj organoj de ĉiuj popoloj estas malsamaj, ke ĉiu elparolas artan lingvon alie kaj la uzantoj de tia lingvo ne povas komprem unu alian, vĕnu al ni, kaj, se li estas homo honesta kaj ne volas konscie mensogi, li konfesos, ke li eraris.

Výňatky z projevu

Dr. Ludvíka L. Zamenhofa

na prvním světovém kongresu esperantistů v Boulogne-sur-Mer dne 5. srpna 1905.

Vážené paní, vážení pánové!

Zdravím vás, drazí přátelé, bratři a sestry z velké světové lidské rodiny, kteří jste se sešli ze zemí blízkých i vzdálených, z nejrůznějších říší světa, - abyste si vzájemně mohli bratrsky stisknout ruce ve jménu veliké ideje, jež nás všechny spojuje. Zdravím také vás, slavná země Francie a krásné město Boulogne-sur-Mer, které jste laskavě poskytly pohostinství našemu kongresu. Vyjadřuji také srdečný dík těm osobám a institucím v Paříži, které při mém průjezdu tímto slavným městem vyjádřily na mou adresu svou přízeň pro věc esperanta, jmenovitě panu ministru veřejného vyučování, magistrátu Paříže, Francouzské lize vyučování a mnoha různým vědeckým osobnostem. Svatý je pro nás dnešní den. Skromné je naše shromáždění; vnější svět o něm mnoho neví, a slova, jež budou zde pronesena, nepoletí telegraficky ke všem městům a městečkům světa. Nesešly se hlavy států ani ministři, aby změnili politickou mapu světa, neskví se tu nádherné oděvy a množství řádů, neduní děla kolem domu, v kterém dlíme; avšak sálem zní tajemné zvuky, zvuky velmi tiché, neslyšitelné pro ucho, ale takové, jež postřehne každá citlivá duše: jsou to zvuky něčeho velikého, co se teď rodí... Proroci a básníci snili o nějaké vzdálené mlhavé době, v které si lidé vzájemně začnou rozumět a spojí se v jednu rodinu; ale to se zdálo být pouhým snem. Mluvilo se o tom, jako o sladké fantazii, avšak nikdo ji nebral vážně, nikdo jí nevěřil.

A nyní poprvé se sen tisíciletí počíná uskutečňovat. V malém městě francouzského pobřeží se sešli lidé nejrůznějších zemí a národů, a potkávají se tu nikoli němí a hluší, ale rozumějí jeden druhému, mluví jeden s druhým jako bratři, jako členové jednoho národa. Často se scházejí osoby rozličných národů a dorozumějí se; ale jaký obrovský rozdíl je mezi jejich vzájemným dorozumíváním a naším. Tam si rozumí vzájemně jen malá část účastníků, kteří měli možnost věnovat velmi mnoho času a peněz na studium cizích řečí - všichni ostatní se účastní schůze jenom svým tělem, nikoli svou hlavou; avšak v našem shromáždění si vzájemně rozumějí všichni účastníci, nám snadno porozumí každý, kdo si jen přeje nám rozumět, a ani chudoba, ani nedostatek času nezavírají uši našim projevům. Tam je vzájemného dorozumění dosaženo cestou nepřirozenou, urážející a nespravedlivou, protože tam příslušník jednoho národa se pokořuje před příslušníkem jiného národa, mluví jeho jazykem, potupuje svůj vlastní, a stydí se, koktá a červená se a cítí se v rozpacích před svým společníkem, který se cítí silným a pyšným; avšak v naší schůzi nejsou národy silné a slabé, privilegované a bezprávné, nikdo se nepokořuje a neostýchá se; my všichni jsme plně rovnoprávní; všichni se cítíme být členy jednoho národa, jedné rodiny, a poprvé v lidské historii stojíme my, příslušníci nejrůznějších národů, jeden vedle druhého nikoliv jako cizinci, nikoliv jako soupeři, ale jako bratři, kteří si nevnučují vzájemně své jazyky, avšak rozumějí si, nepodezřívají jeden druhého pro tmou, která je rozděljuje, milují se vzájemně a tisknou si ruce nikoli pokrytecky jako příslušník jiného národa příslušníku jiného národa, ale upřímně, jako člověk člověku. Uvědomme si dobře celou důležitost dnešního dne, protože dnes v pohostinných zdech Boulogne-sur-Mer se sešli nikoliv Francouzi s Angličany, Rusové s Poláky, nýbrž lidé s l i d m i . Požehnaný buď tento den a velké a slavné necht' jsou dny příští!

Sešli jsme se dnes, abychom dokázali světu, že to, čemu nechtěl věřit, je skutečností nevyvratitelnou. Dokážeme světu, že vzájemné dorozumívání mezi osobami různých národností je dobře dosažitelné, a že není naprosto nutné, aby se jeden národ před druhým pokořoval anebo navzájem pohlcoval, že přehradu mezi národy vůbec nej-sou něčím nezbytným a věčným, že vzájemné dorozumívání mezi lidskými bytostmi není fantastický sen, ale zjev zcela přirozený... Každý, kdo říká, že neutrální umělý jazyk není možný, necht' přijde k nám a přesvědčí se. Každý,

kdo říká, že hlasová ústrojí všech národů jsou odlišná, že každý vyslovuje umělý jazyk jinak a že uživatelé takového jazyka nemohou rozumět jeden druhému, nechť přijde k nám, a jestliže je to člověk poctivý a nechce vědomě lhát, přizná, že se mýlil...

Sto let Klubu esperantistů v Brně

Oslava 100. výročí založení Klubu esperantistů v Brně pod záštitou primátora města Brna RNDr. Petra Duchoně byla uspořádána 26. května t.r. v reprezentačních místnostech Staré radnice v Brně. Brněnský klub byl prvním esperantským klubem na našem území.

Předseda Klubu esperantistů v Brně Mgr. Zdeněk Hršel nás upozornil, že v minulém čísle Bultena byl nesprávně uveden název brněnského klubu. Správný název byl „První spolek esperantistů rakouských v Brně“, potvrzený c. k. místodržitelstvím 3. srpna 1901, a po změně stanov „Rakouský spolek esperantistů - Aŭstria Societo Esperantista“, potvrzený c. k. místodržitelstvím 9. dubna 1903. Podle obou stanov rozvíjel činnost po celém Rakousku. Ve statistické publikaci Esperantista Centra Oficejo zr. 1907 je uveden jak „Klubo de Bohemaj Esperantistoj“, zal. v říjnu 1901, tak „Germana Grupo Esperantista“, zal. v únoru 1905. Děkujeme p. Hršelovi za upřesnění a všem se omlouváme za nepřesný název brněnského klubu, který jsme převzali z článku Fr. Bartha o založení pražského klubu.

Připomeňme, že prvním předsedou Prvního spolku esperantistů rakouských v Brně byl redaktor Karel Pelant (1874 - 1925), bojovník proti klerikalismu, vůdčí osobnost Volné myšlenky, propagátor kremace. Byl autorem první české brožury o esperantu „Idea řeči mezinárodní“. Předsedou brněnského klubu byl jeden rok, pak se přestěhoval do Prahy, kde byl přítelem Jaroslava Haška. V letech 1910-1914 redigoval v Plzni časopis Směr, když před tím pobýval ve Spojených státech, kde se setkal rovněž s esperantisty. Byl to novinář velmi aktivní, bojovný, horící pro každý pokrok



Jaroslav Mařík

Provo pri skizo de la historio de nia klubo en Prago

Laŭ artikolo en la n-ro 2/1993 de nia BULTENO.

En la ĉeĥa teritorio la unua propagandanto kaj instruanto de esperanto estis la iama volapukisto František Vladimír Lorenc. Naskiĝinta en 1872, li kiel 18-jara studento komencis konatigi esperanton, en la jaro 1889, al anoj de laborista kaj studenta societo en la gastejo de s-ro Pštros, strato Pštrossova n-ro 16, Praha 1. Jam en 1890 li eldonis proprakoste la unuan lernolibron de esperanto por ĉeĥoj. En 1893 li devis elmigri en Brazilon, kie li fariĝis elstara verkisto kiel Francisco Valdomiro Lorenz.

Efektiva movado por esperanto estis lanĉita inter ĉeĥoj en j. 1900 per nova lernolibro, unua revuo ktp. de Theodor Čejka, en Bystřice pod Hostýnem. Jam en la posta jaro, 1901, fondiĝis en Brno Esperantista Societo, la unua en la tiama monarĥio aŭstria-hungara.

Jaron poste, en 1902, estis fondita la ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA, Klub esperantistů v Praze. La tago laŭ iuj estis la 9a de novembro, laŭ aliaj la 9a de decembro. 2-3 fontoj konfirmas la novembron, la ceteraj decembron (mi trovis dekfoje decembron). La 9a de novembro estis dimanĉo, en decembro mardo. Ŝajnas, ke dimanĉo estas pli akceptebla por kunveno ol mardo. Kamarýt foje skribas „novembro“, foje „decembro“. Pri prepara kunveno sciigas I. O. Seleznev en julia numero 1902 de hispana revuo en Santander. Ankaŭ en la Centra ŝtata arĥivo en Praha mankas dokumentoj pri la Klubo ĝis j. 1904. La serĉon faris laŭ mia peto d-ro Boh. Baďura el la Historia instituto de ĈSAV, kiu rajtis tie studi dokumentojn. Ni scias, ke klubaj dokumentoj estis konfiskitaj dum la unua mondmilito fare de la aŭstria polico, kaj tio eble iel rilatas tiun mankon en la praga arĥivo? - Kaj en la revuo „Neděle“ (de Osvětový ústav) noteto diras, ke en la kastelo Loket estis

trovita de s-ro Khel el la Nacia muzeo, en deponejo de la Muzeo, pakajo kun surskribo „Gravaj dokumentoj de Esperantista Klubo en Praha”. Konjekteble temas pri donaco fare de la Klubo? En la Ŝtata arĥivo tamen estas guberniestra aprobo de la kluba Statuto kun dato 23. X. 1901.

La kunveno por fondi la Esperantistan Klubon en Praha okazis (iniciate de vojaĝanta riĉa rusa esperantisto Seleznev, kiu sufiĉe longe aktivis en nia lando), en la gastejo U Štajgrů; la domo staris sur la angulo de la stratoj Vodičkova kaj V jámě (nun tie staras la palaco „U Nováků”).

La unua kunvenejo de la Klubo estis UNION, fama kafejo en la nuna Národní třída, tie staris la iama „Albatros”; tie kunvenadis precipe intelektuloj; familieca medio, kun Esperanto-revuoj; la kunvenojn partoprenis i. a. S. K. Neumann kaj S. Kamaryt. Kiam Union ne plu sufiĉis por la sufiĉe nombra klubanaro, sekvis nova ejo: kafejo TUMOVKA; de 1905 restoracio U DONÁTU, Spálená str.; poste sekvis pluaj kunvenejoj. De proks. 1921 kafejo EDISON (angulo de Na Můstku kaj Na Příkopě); post ĝia likvido en 1926 la Klubo transiris en Sindikatan domon - Odborový dům (Na Perštýně). Kaj sekvis kunvenejo de plej longa daŭro, de 1930 ĝis 1948, la kafejo LOUVRE, Národní tř., I-a etaĝo. En la 48a jaro la kafejo estis likvidita. Tie ni jam havis la kluban bibliotekon, sekrete eĉ dum la nazia okupacio. La prezidanto Šustr pruntadis librojn; jes ja, tiam la klubanoj ankoraŭ interesiĝis pri la esperanta literaturo. En la granda salono okazis en 1937 la oficiala Antaŭkongreso (antaŭ la UK en Varsovio). Post la likvido de Louvre en 1948 nian bibliotekon ni provizore lokis en koridoro ĉe klubano Kutík, kaj poste la prezidanto Šustr akceptis ĝin en sian loĝejon.

Raporto pri la agado de la Esperantista Klubo en Praha en la j. 2000

Pasintjare niaj kunvenoj okazis regule ĉiuvendrede en la Socia Centro en Rybná str. n-ro 27. La tiea kunvenejo estis bona, sufiĉe granda, facile alirebla el la strato, en la grandaj fenestroj ni havis poresperantajn propagandilojn. Sed vendredo estis maltaŭga por plimulto de niaj membroj kaj pro tio ni klopodis akiri alian kunventagon. Malgraŭ tio ne eblas diri, ke niaj kunvenoj estis malmulte vizitataj; la meznombra ĉeesto estis 20 personoj, sed dum iuj kunvenoj la ĉeesto estis pli alta, ekz. por la Kristnaska kunveno venis 40 gesamideanoj. Kelkfoje venis ankaŭ eksterlandaj gastoj, ekz. usona e-isto Brian Krueger, japana e-istino Hisako Sano, Hedva Frimerman el Israelio aŭ la prezidanto de la Astronomia E-Klubo d-ro Alex Mikishev el Israelio. Bedaŭrinde ne efektiviĝis nia renkontiĝo kun la usona komponisto David R. Gaines.

La programo de la kunvenoj estis plu ĉefe konversacia, gvidata de s-aninoj Maudrová kaj Šmidrkalová, sed dum iuj kunvenoj estis ankaŭ alia programo, ekz. la 6an de oktobro 2000 vizitis nin s-anino Eli Urbanová kaj per sia aparta ĉarmo prezentis al ni kelkajn poemojn el sia nova poemaro. Kiel jam estis dirite, ankaŭ la antaŭkristnaska vespero kun kristnaska laboro, tombolo, kantado, hund-dancado, gustumado de dolĉaĵoj kaj kaf-, te- kaj vin-trinkado estis tre bona, ĉar ankaŭ multnombre vizitata.

La novan kunvenejon kun lundo kiel kunvetago ni ŝuldas al s-anino Maudrová. Sed dum la somera paŭzo s. Maudrová invitis nin en sian domon en Karlštejn, kie ni kunvenis la 26an de aŭgusto. Tien venis ankaŭ eksterpragaj gesamideanoj, kiel la novgeedzaj Hauser el Germanio, aŭ s-ano Ludvík Chytil el Přerov. En bona etoso ni pasigis belan someran tagon.

En la pasinta jaro niaj membroj partoprenis ankaŭ aliajn aranĝojn kaj kongresojn, ekz. d-ro Petr Chrdle partoprenis la UK en Tel-Avivo (ni povis aŭdi liajn elpaŝojn tie en la E-disaŭdigoj el Varsovio kaj Pekino); vico da niaj membroj ĉeestis la kunvenojn de handikapitaj esperantistoj: kelkaj el tiuj kunvenoj okazis dum sabat-antaŭtagmezoj en nia kunvenejo; iuj membroj partoprenis la seminariojn en Skokovy. Aliaj membroj ĉeestis kaj ankaŭ aktive elpaŝis en la Kolokvo pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, kiun aranĝis d-ro Chrdle kaj kiu okazis en novembro en la Teknika Universitato (Vysoké učení technické) en Prago.

En la pasinta jaro ni rekomencis eldonadi nian Bultenon, entute aperis 5 numeroj. Ni volas per ĝi informi pri nia agado kaj pri la movado niajn membrojn kaj precipe tiujn, kiuj ne vizitas niajn kunvenojn. Sed en Bulteno troviĝas ankaŭ literaturaĵoj kiel legaĵoj por niaj membroj, kaj ankaŭ ĉeĥlingvaj tekstoj utiligeblaj kiel informoj por neesperantistaj medioj. Tre favora recenzo pri la 2a n-ro de Bulteno aperis en la 18a n-ro de Literární noviny (Literatura gazeto), subskribita de -mal-

(t.e. Igor Malijevský) kaj la 4an n-ron pozitive pritaksis redaktorino de Radio Polonia Varsovio Barbara Pietrzak en la Trarigardo de la Esperanta gazetaro la 10an de oktobro.

Bedaŭrinde la komitato de nia klubo tute ne laboris kaj sekve la plej urĝajn aferojn solvis la triopo Patera - Maudrová - Ondráček. Eble ekde nun, kiam la kunvenoj okazas ne plu vendrede, ankaŭ la komitato komencos vere funkcii. Estas urĝe necese elekti novan komitaton kaj apud la ŝtato de prezidanto elekti novan funkcion de vicprezidanto. La ĝisnuna komitato estis jena: prezidanto Jiří Patera, kasisto Jindřich Ondráček, propagandisto Bohumil Bouzek, kursgvidanto Jaroslava Blažková, komitatano Petr Chrdle, revizoro Helena Maudrová. Sed kun danko ni menciuj, ke tamen troviĝas inter ni membroj, kiuj faras multe pli ol estas necese. Ekz. dankindan laboron plenumas s-anino Marta Křenková, kiu kompletigas la Fotokronikon de nia klubo, kaj s-anino Maudrová, per publikigo de priesperantaj artikoloj en la gazeto Rozhlas.

La financa stato de la klubo estas bona, malgraŭ la elspezoj por Bulteno fine de la jaro la klubo havis pli ol 21 mil kronojn.

La jarkunveno, okazinta la 19an de marto 2001 elektis novan komitaton de la klubo, en jena konsisto: prezidanto: Jiří Patera vicprezidanto: Ing. Josef Trojan propagandisto: Mag. Bohumil Bouzek kursgvidanto: Ing. Jaroslava Blažková kasisto: Jindřich Ondráček komitatano: D-ro Petr Chrdle CSc. revizoro: Helena Maudrová.

La jarkunveno aprobis ankaŭ la raporton pri la agado de la klubo en la jaro 2000 kaj la financon raporton. Krom ĝi estis diskutata la Strategia Laborplano de UEA „Al Lingva Demokratio“.

-jpa-

Claude Piron, belgo, nun psikologo kaj psikoterapiisto, laboris kiel tradukisto kaj protokolisto en UN kaj en la Monda San-organizaĵo. Aŭtoro de libroj pri la lingva problemo, en Esperanto literature aktiva sub la nomo Johán Valano.

Ni prezent as fragmentojn el lia prelego en la konferenco de Svisa Esperanto-Societo kaj de Laŭzana Esperanto-Societo la 3an kaj 4an de septembro 1994 en Cully (laŭ Literatura Foiro - aŭgusto 2000).

En la mondo ekzistas lingva komunik-problemo, tiu problemo kaŭzas multegajn suferojn kaj esperanto aperis kiel metodo kuraci la koncernan suferkaŭzon. Ne nur aperis kiel kuracilo, sed montriĝis efika kuracilo tie, kie ĝi estas aplikata.

Tiu mia vidmaniero intensiĝis, de kiam mi ekde pasinta jaro rilatas kun rifuĝintoj. Kiom da turmentoj, komplikaĵoj, suferoj portas kun si la manko de lingva komunikilo! Kiam vi staras, kiel okazis al mi, antaŭ virino, kiu travivas kvazaŭ-histerian krizon, kaj kiu parolas nur albane, kaj via povo helpi estas praktike nuligita pro la manko de komunikilo, vi ne plu povas rigardi vian esperantistecon kiel la simplan plezuron esperantumi inter ni. Tiu persono klare bezonis psikologian helpon, kaj klare ŝi povus ricevi ĝin, se ekzistus komuna lingvo kun la psikoterapiisto. Sed neniu komuna lingvo haveblis. En la saman centron iom poste alvenis rifuĝinto el Kosovo, kiu lernis esperanton. Krom esperanto, li sciis nur la albanan. Nu, kvankam li ne dediĉis multe da tempo al tiu lernado, la situacio estis tute alia. Tiu homon mi povis aŭskulti kaj helpi. Inter la aliaj rifuĝintoj de la centro, pluraj havas ian scipoveton pri la angla, la germana, la rusa, kiujn ili lernis dum jaroj kaj jaroj. Sed kvankam ankaŭ mi dediĉis multe da tempo al tiuj lingvoj, la komunikado kun ili estas ege malrapida, sennuanca, senviva, laciga, unuvorte frustra. Ne sufiĉe efika por fari taŭgan laboron. Similaj travivaĵoj estas por mi plia pruvo, ke la komunikproblemo estas grava homa problemo, ke esperanto estas solvo multoble pli efika ol la aliaj, kaj do ke ne fan ĉion eblan por konsciigi la socion pri la problemo kaj ĝia solvo estas farmaniero asimilebla al rifuzo helpi endanĝerigitan personon. Kiam ekzistas malsano, kaj efika kuracilo estas konata, tiuj, kiuj ne provas diskonigi la efikecon de la kuracilo, ne faras, kion estus normale fari...

En la nuna socio tri sistemoj estas aplikataj por superi la malfacilajn ligitajn al la lingva diverseco: la burokrata, la sovaĝkapitalisma kaj la demokratia. La burokrata estas tiu de UN, de la Eŭropa Unio kaj de similaj organizaĵoj: oni elspezas nekredible altajn kvantojn da mono, tempo kaj energio elektra kaj nerva, por malaltnivela rezulto. La sovaĝ-kapitalisma estas tiu, kiu obeas la leĝon de la ĝangalo: la plej forta trudas sian lingvon, kiel okazis en la pasinta jarcento pri la franca,

kiel okazas nuntempe pri la angla, kiel eble okazos venontjarcente pri la japana. La demokratia sistemo estas tiu, kiu ne donas apartan potencon al unu kulturo aŭ popolo, kaj kiu samtempe evitas la himalajajn malŝparojn kaj neefikecon de la burokrata sistemo. Esperanto estas pri ĝi bonega ekzemplo.

Por mi indas informiĝi pri la faktoj kaj ilin diskonigi. Rilate al la burokrata sistemo, ekzemple, al mi ne estas indiferente, ke Eŭropa Unio tradukas ĉiutage inter tri kaj kvar milionoj da vortoj, je tia kosto, ke ĉiu vorto kostas tiom, kiom necesas por savi la vivon de tri infanoj mortontaj pro diarea malsano. Kien iras la mono de la socio, de la impostpagantoj, tio ne estas malgrava. Kompreneble, lingva komunikado estas nur unu aspekto de multe pli vasta problemo, sed ĝi estas aspekto, pri kiu eblas krei konsciigon. Se oni komparas la malaltajn kostojn de homa solidareco, kiu ne povas konkretiĝi manke de mono, kaj la altegajn kostojn de la burokrata maniero lingve komuniki, oni tuj vidas, kiom indus restrukturi la nunan mondan komunik-ordon.

Simile, por mi ne estas indiferente, rilate al la sovaĝkapitalisma sistemo, ke pro ĝi milionoj da infanoj tutmonde suferas.

Claude Piron, Belgiĉan, nuni psikolog a psikoterapeut, pracoval jako překladatel a zapisovatel v OSN a ve Světové zdravotnické organizaci. Autor knih o jazykovém problému, v esperantu literárně činný pod jménem Johán Valano.

Přinášíme výňatky z jeho přednášky na konferenci Švýcarské esperantské společnosti a Lausanské esp. společnosti 3. a 4. září 1994 v městě Cully (podle časopisu Literatura Foiro - Literární veletrh - srpen 2000.)

Na světě existuje jazykový komunikační problém, tento problém vyvolává mnoho utrpení a esperanto se ukázalo jako metoda léčby příčiny tohoto utrpení. Objevilo se nejen jako lék, ale ukázalo se účinným lékem tam, kde je používáno.

Tento můj náhled se zesílil od té doby, kdy od loňského roku se stýkám s uprchlíky. Kolik trápení, komplikací, utrpení s sebou nese nedostatek jazykového sdělovacího prostředku! Když stojíte, jako se to stalo mně, před ženou, která prožívá kvazihisterickou krizi a která mluví jen albánsky, a vaše schopnost pomoci je prakticky nulová pro nedostatek sdělovacího prostředku, nemůžete více považovat své esperantství za prosté potěšení esperantit mezi svými. Ta osoba jasně potřebovala psychologickou pomoc a jasně by ji byla mohla dostat, kdyby existoval jazyk společný s psychologem. Avšak žádný společný jazyk nebyl k mání. Do téhož střediska trochu později přišel uprchlík z Kosova, který se učil esperantu. Kromě esperanta znal jen albánsky. Nuže, ačkoliv nevěnoval mnoho času učení, situace byla zcela jiná. Toho člověka jsem mohl vyslechnout a pomoci mu. Mezi jinými uprchlíky ve středisku nejeden měl jakousi malou znalost angličtiny, němčiny, ruštiny, které se učili léta letoucí. Avšak třebaže také já jsem věnoval mnoho času těmto jazykům, komunikace s nimi byla velice pomalá, šedivá, neživá, únavná, jedním slovem frustrační. Nedostatečně účinná pro vhodnou práci. Podobné zážitky jsou pro mne dalším důkazem, že komunikační problém je důležitým lidským problémem, že esperanto je řešením mnohonásobně účinnějším, než jiné, a tedy že nedělat všechno pro to, abychom uvědomili společnost o tomto problému a jeho řešení je jednání ztotožnitelné s odmítnutím pomoci ohrožené osobě. Když existuje nemoc a účinný lék je znám, ti kdo nezkoušejí uvést ve známost účinnost tohoto léku, nedělají, co by se mělo normálně dělat.

V nynější společnosti jsou používány tři systémy pro překonání těžkostí spojených s jazykovou růzností: byrokratický, divoce kapitalistický a demokratický. Byrokratický je ten používaný OSN, EU a podobnými organizacemi: vydává se neuvěřitelně velké množství peněz, času a energie, elektrické i nervové, pro výsledek nízké úrovně. Divoce kapitalistický je ten, který se řídí zákonem džungle: nejsilnější vnucuje svůj jazyk, jak tomu bylo v minulém století s francouzštinou, jak tomu je nyní s angličtinou a jak možná tomu bude v příštím století s japonštinou. Demokratický systém je ten, který nedává zvláštní moc jedné kultuře či národu a který

se současně vyhýbá himalájskému plýtvání a neúčinnosti byrokratického systému. Esperanto je toho výborným příkladem.

Pro mne má cenu seznámit se s fakty a informovat o nich. Ve vztahu k byrokratickému systému, například, není mi jedno, že Evropská unie překládá denně mezi třemi a čtyřmi miliony slov za takovou cenu, že každé slovo stojí tolik, kolik je třeba k záchraně života tří dětí, které zemřou na průjmovou nemoc. Kam jdou peníze společnosti, plátců daní, to není bezvýznamné. Pochopitelně jazyková komunikace je jen jedním aspektem mnohem širšího problému, avšak je to aspekt, který je možno si uvědomit. Jestliže porovnááme nízké náklady lidské solidarity, která se nemůže realizovat pro nedostatek peněz, a velice vysoké náklady byrokratického způsobu jazykové komunikace, hned je vidět, jak by bylo záhodno přebudovat nynější světový komunikační řád.

Božena Němcová

PRI PEĈULETO

Peĉuleto estis malgranda knabeto kaj vivis ĉe iu cervo, kiu havis oran kornaron. La cervo iradis paŝti sin kaj ĉiam forirante ordonis al Peĉuleto, ke li fermu kaj neniun enlasu. Peĉuleto ĉiam fermis kaj longe neniun frapis la pordon. Sed iun tagon iu frapis al la pordo kaj kiam Peĉuleto demandis, kiu estas, aŭdiĝis de ekstere mioldolĉaj voĉoj:

„Ho, knabeto Peĉuleto,
malfermu al ni la ĉambreton,
nur du fingretojn ni tien ŝovos,
nur mallonge ni varmiĝos
kaj tuj poste ni foriĝos.“

Peĉuleto ne volis malfermi; la voĉetoj ekstere ankoraŭ pli dolĉe petis. Peĉuleto tre volonte malfermus al ili, sed li timis la cervon. Li diris, ke li ne malfermos, ne kaj ne, kaj ne malfermis. Post kiam venis la cervo, Peĉuleto diris al ĝi, ke iu frapis al la pordo, ke mioldolĉaj voĉetoj petis, ke li malfermu al ili; sed li ne malfermis. - „Bone vi faris, Peĉuleto, ke vi ne malfermis, tio estis driadoj. Se vi estus malfermintu, ili forkaptus vin.“ - Peĉuleto ĝojis. La sekvintan tagon la cervo ree iris paŝti sin kaj Peĉuleto fermis. Tiam post nelonge aŭdiĝis antaŭ la pordo ankoraŭ pli dolĉaj voĉoj ol la pasintan tagon:

„Ho, knabeto Peĉuleto,
malfermu al ni la ĉambreton,
nur du fingretojn ni tien ŝovos,
nur mallonge ni varmiĝos
kaj tuj poste ni foriĝos.“

Sed Peĉuleto, ke li ne malfermos, kvankam li volonte malfermus kaj la driadojn rigardus. Tiam la driadoj komencis antaŭ la pordo pro malvarmo tremi kaj plori, ĝis Peĉuleto komencis kompati ilin. Tiam li iom malfermetis la pordon, por ke ili povu tien du fingretojn ŝovi. Kaj la driadoj dankis lin kaj tuj ili ŝovis inter la pordon du blankegajn fingretojn, poste la tutan manon, kaj jam ili estis en la ĉambreto. Peĉuleton ili kaptis kaj for kun li kuris. Tiam Peĉuleto komencis voki:

„Trans montoj, trans valoj,
la ora kornaro kie sin paŝtas!
La knabeton Peĉuleton
driadoj forportas.“

La cervo paŝtis sin nemalproksime kaj aŭdinte la voĉon de Peĉuleto ĝi alkuris kaj forprenis

lin de la driadoj. - Hejme Peĉuleto ricevis batpunon por memori, ke alifoje li malfermu al neni. Peĉuleto firme enkapigis al si, ke li ne malfermos, eĉ se la driadoj ankoraŭ pli dolĉe petus. Kelkajn tagojn venis neni, sed iun tagon denove aŭdiĝis voĉetoj antaŭ la pordo:

„Ho, knabeto Peĉuleto,
malfermu al ni la ĉambreton,
nur du fingretojn ni tien ŝovos,
nur mallonge ni varmiĝos
kaj tuj poste ni foriĝos.“

Peĉuleto tamen, kvazaŭ li ne aŭdas ilin. Nur kiam ili tre multe pro malvarmo tremis kaj tiom petis, ke li nur iomete ilin varmigi lasu, li diris, ke li ne malfermos al ili tial, ke ili lin ree forportus.

„Ne, ni ne forportos vin,
kaj se tamen, vi devas nenion timi,
ĉe ni vi fartus pli bone ol ĉi tie,
vi havus abundon da ĉio
kaj ni senĉese ludus kun vi“

Peĉuleto denove lasis sin persvadi kaj malfermetis, sed la driadoj en momento staris en la ĉambreto, Peĉuleton kaptis kaj forfuĝante ili minacis al li, ke ili mortigos lin. Peĉuleto vokis denove:

„Trans montoj, trans valoj,
la ora kornaro kie sin paŝtas!
La knabeton Peĉuleton
driadoj forportas.“

Sed ĉi-foje estis vane, la cervo paŝtis sin malproksime, ne aŭdis lin, kaj la driadoj forportis lin en sian hejmon. La povra Peĉuleto fartis bone - estas vere, per nuraj frandaĵoj ili nutris lin, sed nur por tio, ke li dikiĝu, kaj tiam ili volis mortigi lin. Ili fermis lin kaj neni ludis kun li. Kiam li jam multajn tagojn estis ĉe ili kaj multajn bongustaĵojn kaj frandaĵojn li formanĝis, venis la driadoj al li, por ke li montru al ili la etfingron; kiam li la etfingron montris al ili, ili tranĉis en ĝin, ĉu sufiĉe dika ĝi estas. Ĝi ŝajnis al ili sufiĉe dika; ili do prenis lin, senvestigis, metis en trogeton kaj portis al forno. Peĉuleto sentis teruran angoron, petis ilin, ke ili kompatu lin, sed ili diris nenion - tiam Peĉuleto komencis plori kaj voki:

„Trans montoj, trans valoj,
la ora kornaro kie sin paŝtas!
La knabeton Peĉuleton
driadoj portas.“

Jen aŭdiĝas rapidaj saltoj, la orkornara cervo alkuras, la knabeton Peĉuleton sur la kornaron surmetas kaj forkuras kun li hejmen. - Sed hejme Peĉuleto ricevis egan batregalon kaj promesis, ke jam ĉiam li obeos kaj neniam plu malfermos al la driadoj, kaj li ankaŭ ne malfermis.

Tradukis Jiří Patera

Božena Němcová

KIU ESTAS PLI MALSAĈA?

El la tuta havaĵo de iu etkampulo restis nenio pli ol unu kokino. Li sendis edzinon al bazaro, por vendi ĝin.

„Kaj por kiom?“ demandis la edzino.

„Nu kiom, kiom la merkato pagas.“

La edzino prenis la kokinon kaj iris. Ĉe la urbo ŝi renkontis iun kampulon. „Onklo, aĉetu la kokinon!“ ŝi kriis al li.

„Kaj por kiom ĝi estas?“

„Nu, kiom la merkato pagas.“

„La merkato pagas groŝon.“

„Nu, ĝi do estas por groŝo.“

La kampulo donis groŝon al la edzino kaj ŝi donis al li la kokinon. Ŝi iris en la urbon, aĉetis tie por krejceroj saketon, por krejceroj ŝnureton kaj unu krejceron ŝi metis en la saketon. Tiam ŝi pendigis ĝin sur bastonon, metis sur la ŝultron kaj iris hejmen. La etkampulo faris grandegan rumoron, kiam la edzino la enspezitan moneron al li alportis. Sed iom-post-iom la afero klariĝis en lia kapo kaj li diris al ŝi: „Nun vi ne estos batpunata; mi iros en la mondon, kaj se mi ne trovos pli grandan frenezulon, ol estas vi, nur tiam mi batregalos vin.“

Li do iris en la mondon. Iun tagon li venis en urbon, starigis sin antaŭ palacon, el kies fenestroj sinjorino rigardis, kaj komencis saltadi kaj la manojn kaj kapon al la ĉielo levi. La sinjorino momenton rigardis lin, sed poste sendis serviston por demandi, kion tiu homo faras.

„Nu, kion mi faras, mi volas en la ĉielon. Mi tie kun iu kamarado manbatalis, kaj li ĵetis min malsupren. Nun mi ne povas trovi la truon en la ĉielon.“

La servisto kuris reen kaj laŭvorte ĉion mesaĝis al la sinjorino.

La sinjorino tuj venigis la etkampulon.

„Ĉu vi estis en la ĉielo?“ ŝi demandis lin, kiam li venis al ŝi.

„Kompreneble mi estis, sed denove mi tien iros,“ respondis la etkampulo.

„Ĉu vi ne konas tie mian fileton?“

„Kaj kial mi ne konas lin, li sidas tie sur fomo.“

„Ho dio, ĉu sur fomo? Ĉu vi ne estus tiel bona kaj prenis kune por li la jenajn tricent florenojn kaj tolon por ses fajnaj ĉemizoj kaj dirus al li, ke mi baldaŭ venos tien, li ne plendu kaj pro neniu mizero suferu?“

„Tre volonte mi ĉion prizorgos, nur donu tion al mi.“

La sinjorino donis al li la monon kaj la tolon kaj li iris en la ĉielon. Ekster la urbo li sidigis sin ĉe barilo kaj ŝovis la monon kaj la tolon en la pantalonon. Apenaŭ la etbienulo foriris, venis hejmen la mastro de la palaco; la sinjorino tuj rakontis, kion ŝi sendis al la fileto.

„Ho, vi nepensanta virino! Kiu iam aŭdis, ke iu falis de sur la ĉielo, kaj eĉ se falis, ke li denove venis tien? La sagaca ruzulo trompis vin.“

La sinjorino diris, kiel tiu homo aspektis, kaj la mastro surĉevaliĝinte rajdis post lin. La etbienulo ankoraŭ sidis sur la sama loko; vidante alrajdi la mastron, li kovris sekan terbulon per sia grandega ĉapelo.

„Mi petas vin, patreto, ĉu vi ne vidis preteriri iun homon kun mansaketo?“ demandis la mastro.

„Certe mi vidis, tien al la arbaro li kuris kiom li kapablis. Li estis fremdulo; tiuj estas ruzuloj. Kion li faris, moŝta sinjoro?“

La mastro konfidencis al li ĉion.

„Nu tia damnita ruzulo, tian sinjorinon trompi! Sed vi estas tute laca. Rigardu, mi mem kurus post lin, nur se iu sidus ĉi tie anstataŭ mi. Mi havas altvaloran birdon jen sub la ĉapelo, mi


portas ĝin donace al iu sinjoro en la urbon kaj mi timas, ke ĝi forflugos.

„Nu bone, mi sidos ĉi tie por tempeto. Ĉar vi konas la ŝteliston, estos por vi pli facile kapti lin,“ diris la mastro, deĉevaliĝis kaj proponis la ĉevalon al la etbienulo.

„Sed kompanse mi petas vin, moŝta sinjoro, ke vi ne ŝovu la manon sub la ĉapelon, la birdo povus forflugi kaj mi estus multe pagonta.“

La moŝta sinjoro sidigis sin al la ĉapelo kaj la ruza etbienulo saltis sur la ĉevalon kaj rajdis kun la donacoj hejmen. La moŝta sinjoro sidis dum nemallonga tempo kaj atendis, sed dum la tempo estis pasanta kaj la viro ankoraŭ ne revenis, ĉio komencis lin tedi. Li opiniis, ke li prenos la birdon kun la ĉapelo hejmen kaj la etbienulo povos poste veni en la palacon por tio. Li do levis leĝere la ĉapelon, ŝovis sub ĝin la manon - kaj kapt! Li eltiris la sekan terbulon. - Malbenante la ruzulon por eteme li venis hejmen kaj rikoltis abundan rikanon. Sed la etbienulo, proksimiĝante al la vilaĝo, jam de malproksime al la edzino kriis: „Neniom timu, edzino! Mi ne plu intencas bati vin. Mi trovis ankoraŭ pli malsaĝajn homojn, ol estas vi.“

Tradukis Jiri Patera



Strážnická pošta používá příležitostná razítka k různým esperantským akcím.

V současné době to bylo u příležitosti 53. kongresu Mezinárodní federace esperantistů-železničářů od 12. do 19. května v Táboře a rovněž k Mezinárodní esperantské konferenci OSIEK ve dnech 14. až 20. 7. 2001 ve Strážnici. Při této příležitosti používá rovněž zvláštní R-nálepku.

Pro zajímavost uveřejňujeme i razítko z roku 1997 používané na počest 95 let našeho klubu.



Věra Ludíková pri Jiří Karen

Enkondukaj vortoj al la lasta poemaro de Jiří Karen „Výpravy Dona Quijota do hlubin lidské duše“ (Ekspedicioj de Don-Kihoto en profundaĵojn de la homa animo)

Ĝuste antaŭ unu jaro mi persone ekkonis la poeton Jiří Karen. Li skribis al mi, ke legante la esperantan gazeton Bulteno li eksciis pri mia libro Ekaŭdi la animon, eldonita spegulforme esperante-ĉeĥe, krome ĵus skribis pri ĝi al li ĝia tradukinto. Ĉe tio li ekkonsciis, ke la hazardoj, kiam li trafis mian nomon, estis pluraj, ekzemple en la bulteno de la Komunumo de verkistoj Dokořán (Plenaperte) liaj kaj miaj kontribuajoj ripete aperadis en senpera najbareco. Ĉar mi mem bone scias, kio ĉio estas ligita kun tio, kiam oni ne kontentiĝas kun la verkado nur por tirkesto, mi proponis al li helpo ĉe eldono de nova libro, kiu ĝuste nun strebas alparoli pluan leganton. Mi renkontis tiaspecan Don-Kihoton de hodiaŭo, kiu siajn revojn ne povas ja plenumi, sed li havas fidon al la homaro, al la misio de la beletro, kun kiu ni renkontiĝas tra la mondo. Meze de lia ĉambro, komplete plenigita per libroj kaj bildoj ricevita de amikoj, ĉeestis la poezio. Pri la intereso de la poeto parolas la titoloj filozofiaj, religiaj, pluaj pri la mitologio kaj historio. La plej honoran lokon certe havus libro, kiu enhavus la saĝon kaj la verojn de ĉiuj nacioj, la pensojn de ĉiuj religioj, de ĉiuj filozofioj, plie ĉion plej esencan el poeziaj kaj prozaj verkoj, sekve io kiel la Biblio de la 21a jarcento, sed se tia libro entute ekzistus, kiel li mem diras. Per sia vivokredo la poeto Jiří Karen aliĝas al la protagonisto de sia nova kolekto: „Diru la veron eĉ en la mensogplena mondo, amu la belecon eĉ en la mondo plena de malbeleco, serĉu la justecon eĉ en la mondo plena de krimeco, la atnon meze de malamo, la ordon meze de anarĥio kaj haoso.“

Věra Ludíková (2000)

Poetino kaj verkistino Eli Urbanová (orig. n. Eliška Vrzáková) naskiĝis 8. 2. 1922 en Čáslav en Ĉeĥio, finstudis pedagogian instituton en la naskiĝurbo kaj dediĉis sin al pedagogia aktivado en la fako muzika kaj en la fako de senta edukado, en kiu ŝi laboris eĉ teorie. (Interparoloj kun infanoj, ĉeĥa eldono 1975, la dua eldono 1984). Kiel studentino ŝi eldonis poemkolekton en la ĉeĥa Spegulo (Čáslav 1941, pseŭdonomo Eliška Doubravská). Post la alveno Pragon ŝi komencis interesiĝi pri Esperanto kaj eminentis en ĝi antaŭ ĉio kiel poetino. Ŝi iĝis ano de la internacia Akademio de Esperanto. Ŝi estas ano de la ĉeĥa Civito de Verkistoj kaj de la internacia verkista organizaĵo EVA. Ŝi estas vicigita en la renoma brita eldono de Who is Who (1994). El la poemaroj en Esperanto ni menciuj Nur tri kolorojn, eld. La Laguna 1960, El subaj fontoj, Praha 1981, Verso kaj larmo, Saarbrücken 1986, kaj Vino, viroj kaj kanto, Chapeco en Brazilo 1996. Grandan atenton gajnis ŝia aŭtobiografia romano Hetajro dancas, eld. 1995 en Chapeco en Brazilo. Tiun ĉi romanon verkis la aŭtorino samtempe en la ĉeĥa versio. Urbanová koncentris ĉirkaŭ si la grupon de pragaj beletristoj, kiuj kreis kiel ĉeĥlingve tiel en Esperanto, apogante sin sur la spertoj de la Praga lingvistika skolo, kiu science kialigis la diferencigitan, ofte kontraŭan, specifan manieron de la vortelektado konsidere al la diversa funkcia stilo komuna, faka aŭ beletra. Majstra regado de la vortelekta aspekto karakterizas ankaŭ la vivsukan aŭtoran lingvaĵon de Urbanová.



Josef Rumler

*El la revueto **Bojado** de nia membrino Pavla Zemanová ni elektis:*

Komuniko de incita infano

Malgranda knabo Ling Rimpotché estas estonta posteulo de la Sankta Moŝto Dalai-lamao, kiu estas la plej alta rangulo en Tibeto. Ling vivas en vilaĝo Dharam-sala, same kiel Dalai-lamao, kiu vivas tie ĉi jam de la jaro 1960. Ling havas tri hundojn ŝpicrasajn kaj unu katon, kaj sian rilaton al bestoj li esprimis simple: „La bestoj estas necese ami kiel homojn, kaj al ĉiuj bezonatoj ni devas helpi.“ Lia komuniko al homoj antaŭ televiziaj kameraoj estis jena: „Ni preĝu por paco en la tuta mondo.“

La artikolo estis publikigita en la gazeto „Hundo, la amiko de homo“ kaj e-igis ĝin Pavla Zemanová.

Punktita dimanĉo

Muzika grupo Zombie kune kun radio-stacio „Zlatá Praha“ (Ora Prago) aranĝis por kvarpiedaj amikoj renkontiĝon antaŭ granda magazeno „Interspar“. Dum frosta vetero renkontiĝis ne nur dalmatinoj, sed ankaŭ la ĉefa aktoro el filmo „Beethoven“, plue pudelo kaj kelke da mikstrasaj hundoj. Hundoj konkuris pri sia beleco, pri la plej punktita hundo kaj pri sia lerteco. Hundoj, kiuj ne estis dalmatinoj, havis almenaŭ punktitan rubandon aŭ punktitan trikoton. Mia Dája gajnis la 1-an lokon en la lerteco kaj de la aranĝantoj ricevis 10 kilogramojn da hunda nutraĵo. Mi ricevis trikoton kun bildo el filmo „102 dalmatinoj“.

Pavla Zemanová

La gazeto BOJADO anoncas al vi, ke aperis nova ĉeĥa muzikgrupo „LAPUTA“, kiu kantas gajajn kaj humurajn kantojn. Por Ĉeĥa televido la grupo preparis belegan video-klipon „Kristiano kun Maria“. Dum la tuta klipo dancas malgranda kvarpieda Dája kun la redaktoro de Bojado Pavla Zemanová. La specialan kompakt-diskon kun la klipo, kiun eblas kunigi al komputilo, vi povas mendi ĉe ekspedo-servo: BMG Music.

LINGVA ANGULO

Longaj jaroj ne ĉiam devas esti multaj.

Ĉeĥaj esperantistoj ofte diras „longaj jaroj“, kiam ili volas emfazi, ke ia multjara afero pasis eksterordinare malrapide kaj ŝajnis esti tro longdaŭra. Sed ie mi legis, ke la esprimo „longaj jaroj“ estas malĝusta, ĉar la jaroj estas ĉiam egalaj 365- aŭ 366-tagaj. Sekve ne povas esti jaroj longaj. La esprimo „longaj jaroj“ sekve estas malĝusta kaj nelogika kaj tial estas konsilinde diri „multaj jaroj“.

Nu bone, eble por ekzemplo estas pli ĝuste diri, ke „La konstruado de la nova stadiono daŭris multajn jarojn“, ol diri ke ĝi daŭris longajn jarojn. Sed ni pripensu la aferon: oni eble planis, ke la konstruado daŭros tri jarojn, sed efektive ĝi daŭris kvin jarojn, do multajn jarojn, multe pli ol oni planis. Kaj por la atendantaj sportemuloj tio estis tre longa tempo, tro malrapide pasantaj jaroj, do vere longaj jaroj.

Ĉu ne okazis al vi, ke vi devis atendi en vico ie en oficejo, ĉe razisto aŭ eble ĉe dentkuracisto? La tempo nur malrapide pasis, vi certe opiniis, ke vi atendis dum tro longa, preskaŭ senfina tempo, kvankam fine montriĝis, ke tio daŭris nur dek minutojn. Esence malmultajn minutojn, sed por vi eble tro longajn minutojn, eĉ se nur 60-sekundajn.

Ni vidas, ke iam la tempo pasas tro rapide, ni diras, ke ĝi flugas, sed alifoje ĝi ŝoviĝas nekredeble malrapide, simple - laŭ nia subjektiva sento - iam ĝi estas longa, iam mallonga. Tial ni havas longajn jarojn, eĉ se ili tute ne estas multaj, iam en la historio aperas eĉ longaj jardekoj kaj longaj jarcentoj, dum en la vivo de simpla homo povas esti ankaŭ longaj monatoj, longaj vintroj, semajnoj, tagoj, vesperoj, noktoj, horoj, minutoj, sekundoj, do ĉio kio daŭras pli longe ol ni deziras.

Kaj male iam la tempo estas tre rapida, tiam ni diras, ke la vojaĝo daŭris nur du-tri horetojn, ni atendis nur kelkajn minut(et)ojn, ĉio ŝanĝiĝis dum sekund(et)o. Nia tempo-perceptado estras tre subjektiva, tial ne estas mirinde, ke ankaŭ en niaj paroloj tio esprimiĝas. Kaj ni ne evitu longajn jarojn, se ili ŝajnas al ni tiaj.

Jiří Patera

Pražskými ulicemi...

Ulice před Velkým strahovským stadionem v Praze 6 nese jméno „Chaloupeckého“, někdejšího tělovýchovného funkcionáře a novináře, zakladatele Federace dělnických tělocvičných jednot a iniciátora maninské spartakiády (1921), autora pozdravu „Čest práci“. Jiří František Chaloupecký (1890 -1922) byl aktivním členem sociálně demokratické mládeže v Praze, později v sociálně demokratické straně. V roce 1911 založil Dělnické sdružení esperantistů, jakožto odbor Dělnické akademie v Praze a byl rovněž spoluzakladatelem časopisu „La Kulturo“.

Na prvním sjezdu Dělnického sdružení esperantistů ve dnech 9. a 10. září 1911 ve velkém sále Křížkovy restaurace v Praze přednesl referát „Esperanto a socialismus“. O tři měsíce později - 23.-27. prosince 1911 - se konal v Národním domě na Smíchově X. sjezd Československé sociálně demokratické strany dělnické. Zde Chaloupecký navrhl sjezdu tuto rezoluci: „X. sjezd Československé sociálně demokratické strany dělnické konaný v prosinci 1911 v Praze uznává důležitost světového jazyka mezinárodního pro mezinárodně organizovaný proletariát a zvláště pro dělnictvo národů malých, které jinak právě následkem své malosti jsou cizinou přehlíženy a umlčovány ve svých osobitých tužbách, doporučuje organisovaným soudruhům a soudružkám propagandu esperanta a žádá soudružské instituce a redakce, aby této propagandě vycházely dle možnosti vstříc.“ Text této rezoluce doporučili svým podpisem četní straničtí předáci, mezi nimi poslanci L. Aust (za zastupitelstvo strany), R. Jaroš (za časopis Odborové sdružení), A. Němec (za výkonný výbor strany), dr. L. Winter (referent strany), J. Stivín (za redakci Práva lidu) a řada dalších, mezi nimi např. i A. Zápotocký. Navrhovací komise doporučila sjezdu návrh rezoluce ke schválení (ref. L. Pik) a v posledním sezení sjezdu (27. XII. 1911) byl návrh schválen. To byl vynikající úspěch J. F. Chaloupeckého v práci pro esperanto.

Před tím, v roce 1907 bylo v Paříži publikováno zreformované esperanto pod názvem „Ido“, t. j. Potomek. Bylo to dílo t. zv. „Delegace pro zvolení pomocné řeči mezinárodní“, která

posuzovala různé mezinárodní jazyky a nakonec prosadila ido, reformované esperanto, proti původnímu esperantu Zamenhofovu. Většina esperantistů ido odmítla a „Delegaci“ kritizovala. Ke kritikům patřil i Chaloupecký, který v r. 1911 uveřejnil dva odsuzující články v „Časopise českých esperantistů“.

Avšak v roce 1913 J. F. Chaloupecký náhle změnil názor, esperanto opustil a přešel k idu. Snad to byla jeho touha po něčem stále novém, snad to byly i neshody s ostatními esperantisty. Začal propagovat ido a u brožur, které vydával, uváděl dvojjazyčné názvy v češtině a v idu.

Dne 3. dubna 1914 český časopis Národní obzor uveřejnil jeho článek, v kterém napadl tvůrce esperanta dr. Zamenhofa. Obvinil ho, že předem souhlasil s reformou esperanta, sám prý podal několik návrhů na změny v jazyce, a vůbec za zády esperantistů prý tajně a za finanční náhradu smlouval o reformách v jazyku esperantu.

Esperantista z Plzně poslal překlad tohoto článku dr. Zamenhofovi do Varšavy a ten mu odpověděl dopisem, z něhož, citujeme: „S velkým rozhořčením jsem četl ten hanebný a lživý článek. Stydím se nyní, že takovou osobu, jakou je pan Chaloupecký, jsem nazýval kdysi svým přítelem. Jestliže zavrhl esperanto a bojuje proti němu - to je jeho věc, avšak jestliže chce diskreditovat esperanto a proto si vymýšlí různé lži proti autoru esperanta a uveřejňuje je v časopisech - to je věc nečestná a ostudná... Ví velmi dobře, že kdyby mě lákaly „franky“ anebo kdybych se chtěl chovat nelojálně vůči esperantistům, byl bych teď velice bohatým člověkem a nepotřeboval bych si získávat své živobytí celodenní ordinací pro chudé nemocné. Bránit se proti takovému nactiutřači nemám v úmyslu. (Tento Zamenhofův dopis je uložen v Mezinárodním esperantském muzeu ve vídeňském Hofburgu.)

J. F. Chaloupecký už byl takový; od sociálních demokratů přešel ke komunistům, od esperanta přešel k idu. Jen předčasná smrt mu zabránila v dalších přechodech a převlecích.

-jpa-

Unu el stratoj en Prago portas la nomon „Chaloupeckého“, laŭ la socialdemokrata kaj poste komunista funkciulo kaj ĵurnalisto Jiří František Chaloupecký. Li fondis laboristan esperantistan organizaĵon kaj en la j. 1911 la X-a kongreso de la social-demokrata partio akceptis de li proponitan rezolucion favoran al Esperanto. Sed en la j. 1913 li transiris al Ido kaj ekde tiam li batalis kontraŭ Esperanto kaj publike li eĉ denunciis d-ron Zamenhof.

Heinrich Heine	Heinrich Heine	Heinrich Heine
LORELEI	LORELEI'	LORELEJ'
Nadarmo ptám se a trudím, proč jsem tak zasmušen; pohádka z dávných časů mi nechce z mysli ven.	Ne scias mi, kial subita Malgaj' en la koro naskiĝis; El tempo jam enterigita Legendo al mi reviviĝis.	Ne scias mi, kion signifas ĉi trist' en mia kor'. Fabelo praa revivas, ne pasas el mia memor'.
Vzduch chladne a již se šefí a tiše plyne Rýn; hor temena se noří v červánků třpytný klín.	Jam malvarmetiĝas l' aero, La Rejno mallaŭte babilas, Per oro de l' sun' en vespero La supro de l' monto rebrilas.	L' aer' freŝiĝis, vesperas kaj fluas Rejn' en trankvil', la supro de mont' fajreras de l' sunsubira bril'.
Tam nahoře nejkrásnější dlí panna černých krás, šperk její zlatý skví se a zlatý češe si vlas.	Plej belan knabinon mi vidas: En ora ornamo brilante, Sur supro de l' monto ŝi sidas, La harojn mistere kombante.	Virgino sidas plej bela sur pint' en mistera glor' kun brila ornam' juvela, kaj kombas harojn el or'.
Jej zlatým hřebenem češe a píseň pjeje si, že bájný, mocný nápěv zadouvá za lesy.	La oran kombilon ŝi movas Kaj kantas tra l' pura aero, Kaj forto mirinda sin trovas En tiu ĉi kant' de l' vespero.	Ŝi kombas sin or-kombile kaj kantas dum tio ĉi, sonoras sorĉe, sopire potenca melodi'.
Bol divoký pojme mládce, jenž s loďkou pluje sem, on nezří útesy skalní, on zří jen vzhůru něm.	Ŝipeť iras sur la rivero, Ŝipisto ektremis de l' kanto, Kaj blinda por ĉiu danĝero Rigardas li al la kantanto.	Barkiston kaptas en barko sovaĝdolora ekzalt', li lasas ekster rimarko la rifojn, rigardas al alt'.
Ó běda, vlny jej zhlítí, člun s plavcem schýlen v kraj, a tím jen čarozpěvná je vinna Lorelei.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela Perdiĝis sub l' akvoturnado; Ĝin Lorelej' faris kruela, Per sia mirinda kantado.	Kun bark' la barkiston fine, mi kredas, glutis rifej', kaj tion faris fascine per sia kant' Lorelej'.
Přeložil Ervín Špindler	Tradukis L. L. Zamenhof	Tradukis Kálmán Kalocsay

Esperanto v Internetu

Magistrát města Mostu má jako první v ČR oficiální internetovou stránku také v esperantu, a to <http://www.mumost.cz/> Internetová adresa časopisu Starto, orgánu Českého esperantského svazu, je starto@clavis.cz

Internetová adresa esp. zpěváků Žomarta a Nataši je <http://www.iomart.net/>

Podrobný esperantský slovník je možno nalézt na adrese <http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo>

Svahilsko-esperantský slovník má adresu <http://www.vessella.it/kamusi.asp>

Esperantisté na kolech

Čtyři cyklistické karavany před a po Mezinárodním kongresu mladých esperantistů ve Štrasburgu (29. 7. — 5. 8.) pořádá organizace esperantských cyklistů (BEMI, p/a Ivo Miesen, Bloemenweg 102, NL-6221 TX Maastricht, Nederlando, ivo_m@dds.nl).

Mezinárodní cyklistické setkání (IBIRE) se uskuteční od 5. do 9. září 2001 v Doksech u Máchova jezera s denní jízdou na kole (asi 50 km denně) a s večerními esperantskými přednáškami a zábavným programem. (Petr Chrdle, Kava-Pech, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, chrdle@kava-pech.cz.)

„Základy buněčné biologie“ je název velmi výpravné barevné vysokoškolské učebnice, kterou z angličtiny přeložil do češtiny a ve svém nakladatelství vydal mgr. Bohumil Bouzek, člen výboru Klubu esperantistů v Praze. Kniha, v které nechybí ani propagace esperanta, je na prodej za 870 Kč.

Sbírka básní Zdenky Bergrové v dvojjazyčném esperantsko-českém znění právě vyšla pod názvem „Oscilad' de steloj - Chvění hvězd“. Básně do esperanta přeložili Jaroslav Mráz a Miroslav Malovec. Knížku ilustroval a typograficky upravil Věroslav Bergr.

Povídky významného židovského autora Jichoka Lejbuše Perece (1852 - 1915) už tři roky vycházejí v literárním časopise „La Epoko“, vydávaném v Polsku. Z jazyka jidiš je do esperanta překládá Tomasz Chmielik.

Tradičního jarního setkání zdravotně postižených esperantistů v pensionu Espero ve Skokovech v Českém ráji se zúčastnila i řada členů našeho klubu. Dopoledne, po ranním cvičení a vydatné snídani, proběhly kursy pro pokročilé a konversační, odpoledne se zájemci podle svých možností mohli zúčastnit vycházek do nejbližšího i vzdálenějšího okolí, např. do Drábských světniček. Večery patřily kulturním pořadům, např. přednáškám předsedkyně Českého . esperantského svazu pí Podhradské a člena předsednictva Světového svazu esperantistů dr. Chrdleho, nebo vystoupení operního pěvce M. Smyčky z Ústí n. L., promítání espe-rantských videofilmů či zábavnému večeru na rozloučenou. Vydařil se i autobusový výlet do Kosmonos s prohlídkou moderního hotelu Galatea s fitcentrem a s návštěvou neolitické osady Altamira mladých historiků. Pražští esperantisté se už těší na podzimní setkání.

BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Jiří Patera

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

C/o Jindřich Ondráček

Bubenská 17

170 00 Praha 7